

Nova ago por TEO, AMO kaj MONDO, partoprenu!

Kontribuu per fotoj kaj videaĵoj

Eksponu fotojn kaj videaĵojn

Te-amo-ano Tianjin-a Esperanto-Asocio, kiu gajnis premion en la dua filmkonkurso “Teo kaj Amo” nun lanĉas novan agon por Teo, Amo kaj Mondo. Ni celas per la nova ago plivastigi Esperanton, amiki kun te-amantaj esperantistoj kaj teaj profesiuloj kaj per fotoj kaj videaĵoj tra TEO montri diferencojn kaj samecojn de nia mondo.

1. Kontribuu per fotoj kaj videaĵoj:

Temo: TEO

Enhavo: libera

Tekniko: Libera

Lingvo: Esperanto (sed estas bonvena akompani nacian lingvon)

Fotoj:

Fotu interesajn okazojn, eventojn, personojn, vidindaĵojn, konstruaĵojn...pri TEO, skirbu nomon, lokon, personon (se ekzistas en foto) kaj rakonton pri via foto, la vortolongo de rakonto estas libera.

Estas bonvenaj ne-rilataj fotoj kaj grupoj de rilataj fotoj, vi rajtas sendi maksimume 10 ne-rilatajn fotojn, aŭ/kaj maksimume 2 grupojn de rilataj fotoj; kaj se vi sendos grupojn, ĉiu grupo inkludas minimume 2 kaj

maksimume 10 fotojn.

Estas bonvenaj fotoj nigra-blankaj kaj koloraj;

Ĉiu foto mezuras je almenaŭ 3 M kaj en la formato JPG.

Videaĵoj:

Longas 30 sekundoj ĝis unu minuto;

Sen dialogo, sen subtitolo, jes, nur VIDEAĴO;

Formato MP4.

Limdato: La 30-a de junio, 2019.

Sendu al foto2019@qq.com

- (1) via(j)n kontribuaĵo(j)n;
- (2) viajn vivresumon (ĉirkaŭ 500-vortoj longaj) kaj viajn 2 fotojn (unu horizontalan 3264X2488, unu vertikalan 2488X3264, en formato JPG kaj pezas almenaŭ 2 M)
- (3) viajn retadreson, poŝadreson kaj telefonan numeron
- (4) skribu anoncon pri kopirajto kun via subskribo kaj dato, ekz:

Mi garantias, ke la konkursaĵo estas originala, ke mi havas ĉiujn rajtojn kaj ke ĉiuj informoj donitaj estas veraj.

Mi garantias, ke

- La kopirajto pri la muziko por publika uzo estas certigita.

- La personoj en la konkursaĵo permesis ĝian uzon por publika prezento.

- La faranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniu rajto de aliaj personoj estas lezita.

- Post la ago la konkursaĵoj estos libere prezenteblaj por ĉiuj sub la "Creative-Commons-Licence (CC-BY)".

Subskribo: _____

Dato: _____

Donaco:

Profesiuloj pri teo kaj fotado elektos 200 elstarajn fotojn kaj 20 brilajn videaĵojn por sekvaj ekspozicioj.

Aŭtoroj de tiuj kontribuaĵoj ricevos libron pri teo: *Teo kaj Amo: Rakonto pri Teo*, aŭ, *Rakontoj pri Ĉina Teo*, (La libroj estos vendataj en libroservo dum UK-oj en Lisbono kaj Lahtio) .

Ĉiuj partoprenantoj ricevos dankleterojn en Esperanto kaj en la ĉina lingvo.

2. Eksponu fotojn kaj videaĵojn

Ni eksponu la kolektotajn fotojn kaj videaĵojn tra la mondo ekde septembro de 2019. Estas bonvena via aliĝo. Ni liveros al vi fotojn kaj videaĵojn per interreto kaj vi aranĝos ekspozicion en sidejo de via asocio, muzeo, librovendejo, biblioteko, te-trinkejo, te-fabrikejo, lernejo, ktp.

Estas oportuno reklami nian lingvon kaj nian movadon, ĉu ne?

Do AGU!!!

Ni pretas respondi ĉiun demandon kaj diskutos: foto2019@qq.com

Ĝenerala sekretario de Tianjin-a Esperanto-Asocio: Han Daqiang

13902025740@139.com

Vicĝenerala sekretario de Tianjin-a Esperanto-Asocio: Lin Lisha (Lisa)

65202258@qq.com

Membro de Tianjin-a Esperanto-Asocio: Zhang Ping (Ĝoja)

perfectgoja@163.com

Ni atendas vian aliĝilon!

Dankon!

Aldone:

Aliĝilo

Nomo

Lando kaj urbo

Organizaĵo

Mi volas diskonigi vian agon!

Mi volas kontribui per fotoj aŭ videaĵoj!

Mi volas organizi ekspozicion en mia loko.

Retadreso

Telefona numero

adreso